

Katalin Kováts bonvenigas la kunpaŝantojn en Hago

Hago (nacilingve Den Haag aŭ oficiale *s-Gravenhage*) estas mezgranda urbo de Nederlando, situanta inter Amsterdamo (norde) kaj Roterdamo (sude), proksime al la bordo de la norda maro. Hago havas ĉ. 500 mil loĝantojn. Ĝi estas la administra centro de la nederlanda registaro.

La blazono de Hago montras cikonion (foje nomatan ardeo), kiu en la beko tenas angilon.

Ĉi tie troviĝas la reĝa loĝalaco, fakte je ĉ. 500-metra distanco de nia loĝejo. Do, teorie mi ofte povus iri teumi kun la reĝo, aŭ eventuale instrui al la tri princinoj Esperanton, sed bedaŭrinde ili ne scias pri tiu bonega eblo, ĝis nun mistrafita.

En la urbo situas ankoraŭ kelkaj politike gravaj monumentoj kiel ekzemple la *Pacpalaco*, la *Internacia Kortumo*, la *Internacia Puna Kortumo*.

Hago gastigas plurdekojn da ambasadejoj, kaj pro la supre menciitaj instancoj ĝi estas tre internacia urbo, kun pli ol cent diversaciaj loĝantgrupoj.

Kiam mi havas gastojn, mi ĉiam akompanas ilin al mia plej ŝatata muzeo, al Panoramo Mesdag <https://www.panorama-mesdag.nl/> kie videblas grandega rond-pentraĵo, kreita fine de la 19a jarcento.

Mi pretigis por la muzeo Esperanto-version de sonregistraĵo, kiun la vizitantoj povas peti aĉetante bileton kaj aŭskulti ĝin supre, starante meze de la pentraĵo.

Vi povas aŭdi ĝin ankaŭ ĉi tie.

<https://edukado.net/ext/ritedok?d=8873>

<https://edukado.net/ext/ritedok?d=8873> Kaj se ni jam ekskursas en Hago, post tiu muzeo ni iru rekte al Scheveningen, al la marborda kvartalo, por vidi ĉion viditan sur la rond-pentraĵo, sed nun en la vera stato.

La marbordo plenas je hoteloj, restoracioj, miloj da promenantoj ĝuas la belecon de la maro. Ĝi estas speciale bela nun, tute renovigita, ĉar antaŭ 6 jaroj oni altigis la digojn, por preventi, ke la altiĝonta marnivelo inundu la urbon. Jes, iom tristige, sed kiam oni parolas pri la malbonaj konsekvencoj de la klimatsanĝiĝo, estas ĝuste tiu urbo, kiun oni mencias kiel unuan ekzemplon pri tio, ke urboj simple malaperos en la akvo.

Do, oni faris paŝojn, malhelpi, aŭ almenaŭ prokrastigi tion.

La marbordo havis jam antaŭe konatajn statuojn, amuzajn, parte fabelajn figurojn, en diversaj grandecoj, kiuj tre plaĉas al la promenantoj. Ili estas kreaĵoj de usona skulptisto Tom Ottermess.



Blazono de Hago kun la cikonio



Pacpalaco



Panoramo Mesdag



Scheveningen – Bandomo



*Statuo de T. Ottermess –
Haringmanĝanto*

Tre amuza filmeto montras kiel tiuj statutoj trovis por si mem novan, belan lokon. Spektu unu el la filmetoj.

<https://www.youtube.com/watch?v=HL1p0eFvTIw&t=161s>

Kiam mi paŝadas en la urbo, mi elektas iri tra parkoj, el kiuj estas multaj en la verda urbo.

La plej ne-kutima pejzaĝo estas la dunoj, kiuj donas dekojn da itineroj laŭ la marbordo. Kelkfoje la forta mara vento kreas el la sablaj montetoj eksterteran pejzaĝon, kie promenante mi sentas min kvazaŭ mi estus rolanto en filmo. Plurfoje mi renkontis sovaĝe vivantajn bestojn, kiuj simple ĝuas la naturon.

Nederlando famas ankoraŭ pri siaj muelejoj kaj tulipoj.

Kvankam en tiu urbo, kiel en tuta Nederlando, ofte pluvas, la proksimeco de la naturo donas al ni multe da ĝuo.

Kaj vi nun povas demandi, kial estas ĉi tie nia startpunkto? Ĉar ni mem loĝas en tiu urbo, estas tie la sidejo de edukado.net. Kaj krom ni estas ankoraŭ almenaŭ unu afero mencienda por esperantistoj. Ĉi tie vivis kaj agadis dum preskaŭ 50 jaroj la fama rektmetoda instruisto, Andreo Cseh, hungardevena pastro.

En tiu ĉi filmo vi povas spekti pri liaj kofro kaj misteroj registritan prelegon, kiun mi faris antaŭ kelkaj jaroj.

<https://www.youtube.com/watch?v=tS9fiCfBGZ4&t=3s>

Kaj se vi volas scii pli pri Hago aŭ Nederlando, vi vere devas veni, veturi, flugi aŭ marŝi ĉi tien.... ni volonte ĉiĉeronos vin plu.

Kaj nun, ek al nia sekva stacio, al la relative proksima Antverpeno (BE).

Bonan marŝadon.



Dunoj laŭ la marbordo



Muelejo en la kamparo



Andreo Cseh (1895-1970)



Domegoj en la urbocentro



Meze de tulipkampoj